



*Esperanto*

*en Danio*

**14-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2007**



**Esperanto Desperado muzikas  
en la lingva festivalo**

## Esperanto en Danio

membroorgano de  
Dana Esperanto-Asocio

IŭN 0909-6124

### Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder  
Vestavej 4, 2770 Kastrup  
☎ 32 51 31 16 [dea@esperanto.dk](mailto:dea@esperanto.dk)  
Ĝirokonto: 805 7370  
UEA-kodo: deaa-t

### Kromaj estraranoj:

Ina Schultz (kasisto)  
Jens S. Larsen (sekretario)  
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)  
Bent Jensenius  
Rasmus Høyrup Jensen  
Torben Svendsen

### Redakcia adreso:

Jens S. Larsen  
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77  
2770 Kastrup  
☎ 24 47 50 40 [eed@esperanto.dk](mailto:eed@esperanto.dk)

**Presado:** Atlas-Quick

### Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz  
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup  
☎ 32 52 19 58 [ina.schultz@get2net.dk](mailto:ina.schultz@get2net.dk)

Represo de artikoloj el EeD estas  
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.03.2008**

## Enhavo

### Lande

Lingvorajtoj kaj lingvopolitiko..3
Letero de C. Piron al L. Orban..5
Lingvoj en danaj edukejoj.....10
Multaj lingvoj – unu familio.....11
Gazeteltondaĵoj.....12

### Loke

Rusa vizito.....13
Kopenhago.....14
Ålborg.....20
Næstved.....21
Århus.....22

### Monde

Selten en "pola Davos" .....23
Ne plu loko.....25
Ĉiĉeronado en Strasburgo.....26
Honorigo.....26

Anonco.....27
---------------

## Lande

La venonta jarkunveno de DEA okazos  
la 18.-20. de aprilo 2008  
en La Kulturdomo, Dortheavej 61,  
2400 Kopenhago NV,  
kie ni festos la 100-jarajn jubileojn  
de DEA kaj KEK.

Programo kaj aliĝilo sekvos.

## Lingvorajtoj kaj lingvopolitiko



En la lasta numero mi skribis pri la venontaj defioj okaze de la Internacia Jaro de Lingvoj deklarita de UN, kaj la jaro de Interkultura Dialogo en EU. Mi povas konstati, sekvante la informojn de la enlanda gazetaro kaj la diskutojn fare de eŭropaj esperantistoj en diversaj blogoj, ke temas pri la sama aspekto de defio: protekti la nacian lingvon kaj la diversecon de lingvoj

kontraŭ la ĉiam pli prema altrudo de la angla. La nefermita letero de Claude Piron al Komisionano Orban kaj la artikoloj de Lene Niemann en ĉi tiu numero ebligis al niaj legantoj sekvi tiujn diskutojn.

Venkon de la angla oni povis interalie konstati kiam la 22-an de oktobro la Jura Universitato ĉe la Kopenhaga Universitato decidis ke estonte la instruistoj ne bezonas havi scion de la dana lingvo, kaj oni samtempe postulas ke ĉiuj scipovas la anglan! Kiel du profesoroj de la

Universitato akcentis kaj kritikis, tio kontraŭas la lingvan politikon de la Jura Fakultato, ĉar ĝi nuligas la idealon de paralela lingvoscio starigitan de la Kopenhaga universitata estraro. Profesoro Frans Gregersen rimarkas: mi ne scias kiom da juristoj laboros estonte en internaciaj rilatoj, sed mi scias, ke la plejmulto de ili laboron enlande. Ĝenerale estas ĉiam malfacile traduki la juran fakan lingvon en kompreneblan danan, sed se ili tion ne scipovas fari, ili fariĝos malkapablaj juristoj. Peter Harder, profesoro ĉe la Instituto de angla, germana kaj romana lingvoj diras ke estas ĉiam eraro fari elekton inter unu aŭ alia lingvo. Racia elekto estas uzi ambaŭ lingvojn.

La institucio "Dansk Sprognævn" konstatas ke en 130 de la 320 daŭrigantaj altlernejoj oni instruas en la angla lingvo, kaj ekzemple la lernantoj de CBS (Copenhagen Business School) estas devigataj preni anglan fakon en cetere dana studado. Mi havis eblecon lastatempe legi plurajn gazetartikolojn pri la situacio de la dana lingvo, kaj ankaŭ mem skribis artikolon kiu aperos en la Novaĵletero de la dana UN-Asocio pri la lingvaj rajtoj kaj la ebla rolo de Esperanto.

La gazeto Kristeligt Dagblad havis lastatempe serion sub titolo: Potenco de la lingvo, kie oni povis sekvi diversajn opiniojn, interalie de Jørn Lund, la direktoro de la dana Lingva kaj Literatura Asocio. Li estas estro de la lingva komitato starigita de la registraro por evidenti la bezonon de lingva leĝo por protekti la danan lingvon, kiu enfazas ke la dana lingvo estas la lingvo kun kiu ni kreskadis, kaj tiu, kiu malfermas la mondon al ni, kaj pere de kiu ni estas plej kreantaj!

CBS anoncas konferencon la 5-an de decembro pri lingvopolitikaj defioj kie interalie la al ni tre konataj profesoroj Robert Phillipson kaj Tove Skutnabb-Kangas prelegos pri la angla en la integriĝo de Eŭropo kaj pri lingva diverseco. Mi sekvas daŭre la diskutojn kaj partoprenas laŭeble.

*Ileana Schrøder*

## Letero de C. Piron al L. Orban

”KAJ VI, KION VI OPINIAS PRI LA LINGVOJ EN EŬROPO?”

demandas Leonard Orban, Eŭropkomisionano respondeca pri multlingvismo (<http://forums.ec.europa.eu/multilingualism/>).



*Claude Piron*

Dankon, Komisionana Moŝto, ke vi invitas la eŭropanojn konigi al vi sian opinionon. Estas simpatia signo de respekto al la simplaj civitanoj.

La eŭropan lingvoproblemon signas streĉiĝo inter du bezonoj unuavide sinkontraŭdiraj: la bezono efike komuniki kaj la bezono respekti egalecon, kaj ankaŭ ĉies identecon. Uzi la anglan lingvon ne estas

demokratie. Tio transformas en senlingvulojn la grandan plimulton el la eŭropanoj. Observu, kiel komunikas du mezumaj, malsamlingvaj, 30- aŭ 40-jaraj eŭropanoj, kiuj studis la anglan lerneje dum ses aŭ sep jaroj, kaj kies gepatra lingvo ne estas ĝermana. Vi rekonos ĉiujn simptomojn de afazio: ili parolas per dispecigataj frazoj, konstante esploras sian menson serĉe al la dezirata vorto, bezonas aŭdi plurajn ripetojn por kompreni, ne sukcesas prononci tiun aŭ alian fonemon, ktp. Konsidere al la tempo kaj al mensa penado, kiun ili dediĉis al la lingva lernado, tiu rezulto estas priplorinda. La kaŭzo estas, ke la angla ne estas adaptita al la postuloj de interkultura komunikado. Tion objekte pruvas la fakto, ke investo dekoble pli eta donas ege pli bonan rezulton, se la komuniklingvo estas pli saĝe, pli racie elektita.

Ne nur maldemokratias la uzo de la angla, sed estas terura manko de demokratieco en la maniero prezenti la lingvoproblemon al la civitanoj. La altaj respondeculoj, la amaskomunikiloj, la intelekta elito fordonas sin al giganta trompado, verŝajne pli pro simpla nekoscio ol pro volo, sed ajnakaze kun kondamninda ignoro de la konsekvencoj. Trompo facile akceptiĝas. Estas psikologie pli komforte trompiĝi ol fronti al la

realo, kaj la tento vidi laŭ niaj deziroj, kaj ne laŭ la faktoj, neniam forestas. Sed trompo estas trompo, kiaj ajn la faktoroj, kiuj kondukas al ĝi. Kaj trompi la homojn estas maldemokratie.

1. Oni kredigas al la neanglalingvanoj, ke eblas bone regi la anglan.

**Trompo.** Tiu eblo ekzistas nur por parto de la ĝermanlingva loĝantaro, kaj por tiuj, kiuj povas studi dum kvar aŭ kvin jaroj en anglalingva universitato. Eĉ post tio neegaleco kun denaskaj anglalingvanoj plu restas.

2. Oni kredigas, ke lerneja instruado kondukas al regado de la angla. La plimulto el la gejunuloj efektive imagas, ke fininte la kursojn de angla lingvo, ili efektive bone scipovos la lingvon. **Trompo.** En esploro farita en Hanovro ĉe 3700 studentoj kun ok ĝis dek jaroj da angla lingvo montriĝis, ke nur 1% povis esti klasita en la kategorion "tre bone scipovas" kaj nur 4% en la kategorion "bone scipovas". La esploro montris ankaŭ, ke la plimulto el la junuloj havis grandajn iluziojn pri sia nivelo: 34% taksis sin "tre bonaj" kaj 38% "bonaj". **Sintrompo.** Objektiveco, ĉefe pri si mem, ĉiam malfacilas. Bedaŭrinde, tiuj sintrompoj agas kontraŭ demokratio, ĉar ili plifortigas la aliajn trompojn.

3. Oni kredigas, ke lerninte la anglan oni povas komuniki ĉie en la mondo. **Trompo.** En kontinenta Eŭropo pli ol 90% el la loĝantaro ne kapablas kompreni simplan specimenon de ĉiutaga angla lingvo. Provu angle interkompreniĝi kun iu renkontita surstrate en Pollando aŭ Francio. Vi konstatos, ke oni trompis vin pri la universaleco de la angla.

4. Oni kredigas, ke la superregado de la angla kiel ununura mondlingvo estas definitiva, ke temas pri io fatala, kaj ke estas do absurde proponi ŝanĝi la sistemon, eĉ se nur post ia relative longa transira periodo. Historio instruas al ni, ke tiaj juĝoj havas pli da ŝancoj mistrafi ol pravi. Neniu scias, kio okazos morgaŭ. Prezenti supozon kiel realon estas **trompi**.

5. Oni **trompas** la homojn kaŝante, kiagrade la prononco de la angla igas ĝin lingvo tute aparta, pli malfacile elparolebla ol la plimulto el la lingvoj por la plimulto el la homoj. Oni evitas diri, ke la granda nombro – 24 – da vokalsonoj kaj la ĉeesto de sono kiel /th/, kiu ne ekzistas en la lingvoj de 82% el la eŭropanoj, estas konstantaj fontoj de miskomprenoj kaj multobligas la riskojn aperi ridinda. Percepti kaj reprodukti la diferencojn inter *fourteen, forty, thirteen, thirty*, aŭ inter *soaks, socks, sucks, sacks, sex, six, seeks* ktp estas neeble por la plimulto el niaj samplanedanoj.

6. La angla postulas duoble pli da peno ol mezuma lingvo por enmensigi al si ĝian vortprovizon, sed tion oni neniam emfazas.

**Trompo.** En preskaŭ ĉiuj lingvoj ekzistas memorfaciliga formrilato inter vortoj esprimantaj rilataj konceptoj: oni derivas *luna* el *luno*, *dentisto* el *dento*, *malarmado* el *armi*. En la angla necesas ĉiufoje lerni du malsamajn vortojn: *moon/lunar, tooth/dentist, weapon/disarmament*. Krome, oni ne posedas la anglan, se oni ne konas la milojn da duoblaĵoj kiel *buy/purchase, read/peruse, freedom/liberty, threat/menace*, ktp. La granda plimulto el la lingvoj tre bone funkcias sen tia plenŝtopita vortujo.

7. Oni subkomprenigas, ke la angla estas normala lingvo, same preciza kiel la aliaj. **Trompo.** Ĝi estas klare pli malpreciza, ĉar mankas al ĝi gramatikaj signoj kaj ĉar la signifkampoj ofte estas en ĝi tro vastaj. Jen ekzemploj:

a) *Develop an industry* povas signifi same ”starigi industrion”, ”krei industrion, kie industrio ankoraŭ ne ekzistas”, kiel ”disvolvi, ampleksi-igi jam ekzistantan industrion”.

b) *Bush warned against attacking Iran* povas signifi kaj ”Bush avertis kontraŭ la ideo ataki Iranon” kaj ”Bush (estis) avertita (de iuj aliaj) kontraŭ la ideo ataki Iranon”.

c) De mi konata interpretistino komencis traduki *Iraqis today have no power* kiel "Irakanoj hodiaŭ ne havas (politikan) povon, ne havas potencon", kaj nur post kelkaj minutoj pro la sekvo de la parolado komprenis, ke ŝi estus devinta diri "Hodiaŭ estas tago sen elektro-energio en Irako".

d) *English teacher* povas rilati same al anglo instruanta matematikon kiel al hungara instruisto de la angla lingvo.

Mi povus prezenti multegajn ekzemplojn, sed tiuj verŝajne sufiĉos. Mi laboris en relative multaj lingvoj, sed neniu de mi konata estas same dubenca kiel la angla. Tio estas tre ĝena en la jura kaj scienca kampoj.

8. Oni diras, ke Esperanto estas hobbio, amatoraĵo, fantazia utopio, kiu ne vere funkcias. **Trompo.** Se oni komparas ĝin en la praktiko al aliaj rimedoj internacie komuniki – altnivela angla, fuŝa angla, samtempa aŭ sekva interpretado, gestoj kaj balbutado de aĉe regata lingvo, ktp – oni konstatas, ke ĝi tre superas ilin, kvankam ĝi ne devigas investi eĉ groŝon en lingvan komunikadon, kaj kvankam ĝi postulas ege malpli da peno (je sama aĝo kaj sama nombro da semajnaj horoj, ses monatoj da Esperanto havigas komunikkapablon, kiun oni ankoraŭ ne atingis post ses jaroj en alia lingvo, inkluzive de la angla). La rilato efikeco / kosto estas nete pli favora ĉe alpreno de Esperanto ol de la aliaj sistemoj.

9. Oni kredigas, ke la angla estas la sola maniero reagi al la defio, kiun starigas la lingvodiverseco, kaj ke la kostoj, kiujn ĝia uzo okazigas, estas neglektindaj kaj neredukteblaj. **Trompo.** Kostoj konsiderinde malaltiĝus, same en la instruado kiel en la internaciaj rilatoj, se Esperanto anstataŭus la anglan. Ekonomiisto François Grin kalkulis, ke se Eŭropo alprenus Esperanton, tio signifus ŝparon de 25 miliardoj da eŭroj ĉiujare. Oni kredigas ankaŭ, ke la kvazaŭ-monopolo de la angla en lingvoinstruado ne havas malavantaĝojn. Trompo. Ĝia anstataŭigo per Esperanto ebligus dediĉi al aliaj lingvoj la centojn da horoj, kiuj fariĝus liberaj pro la ege pli rapida asimilado de Esperanto, kio kreus veran diversigon de lingvoinstruado. Lernejoj tiel respigus la



kulturan diversecon, dum ili nun devas ĉefe elmeti la junajn mensojn al ununura kulturo fakte – sed neniam eksplicite – prezentita, pro manko de veraj konkurantaj lingvoj, kiel supera al la aliaj.

Resume, la lingva organizo de Eŭropo, kaj verdire de la tuta mondo, baziĝas sur impresa kvanto da trompoj, kiuj ripetiĝas de parolado al parolado, de artikolo al artikolo, egale ĉu la disvastigantoj de malveroj tion faras intence aŭ ĉu – kio certe estas la plej ofta okazo – ili simple ripetas, kion ĉiuj supraĵe diras, ne zorgante kontroli la faktojn kaj ne pensante pri la konsekvencoj de sia konduto.

Kion vi intencas fari, Sinjoro Komisionano, kion la Komisiono intencas fari por restarigi la veron? La elekto de la angla kiel superreganta komunikilo neniam estis objekto de demokratia decido, neniam oni honeste informis la publikon, neniam oni lasis la civitanojn libere elekti. Vera demokratia spirito postulas, ke la respondeculoj objektivie informiĝu pri la karakterizoj de la diversaj opcioj, objektivie kaj honeste informu pri ili la publikon, atentigu ĝin pri la trompado, al kiu ĝi eventuale estas elmetita, kaj lasu ĝin libere decidi. Ĉu vi kontestas tiun vidpunkton? Se jes, sur kio vi bazas vian starpunkton?

Se la Komisiono plu sekvas la vojon de inerteco, ni scios, ke demokratio povas nenion esperi de la eŭropaj institucioj. Ĉia trompo, eĉ se purintence disvastigata povas konduki nur al kontraŭdemokratia evoluo.

*Claude Piron*

## Lingvoj en danaj edukejoj

La kopenhaga Handelshøjskolen (kiu nuntempe nomas sin Copenhagen Business School) anoncis, ke baldaŭ malaperos la eduko de itala kaj rusa lingvoj en la lernejo, kaj fariĝi interpreto eblos nur en la angla. Pesimistoj timas, ke sekvos la edukoj en franca kaj germana lingvoj.

La kandidatoj de tiuj edukoj estas parto de la tutmondigo, pri kiu la politikistoj multe parolas ĉe festaj okazoj. Ili lernas ne nur agi, sed ankaŭ kun scio pri lingvo kaj kulturo, kiun ne donas la 'ordinara komerca' eduko.

La ekonomio kaj sekve la prioritato pri edukoj de Handelshøjskolen estas merkata, kaj la samajn kondiĉojn alfrontas la universitatoj kaj aliaj edukejoj, kaj pro tio oni ne povas plendi pri la agoj de Handelshøjskolen, sed la politikistoj devas ŝanĝi la 'direkton'.

En 2005 la politikistoj iniciatis gimnazian reformon, kies rezulto estos (interalie), ke nur 6% de la studentoj lernas tri fremdajn

lingvojn – kontraŭ 41% antaŭ la reformo.

Mi samopinias kun la aŭtoroj de la artikoloj, ke la ŝanĝoj en Handelshøjskolen same kiel en la gimnazio estas kun la celo havi nur unu fremdan lingvon, kiun danoj lernas je alta nivelo: la anglan. Tio estas laŭ mi danĝera evoluo en mondo, kiu ŝanĝiĝas kaj malgrandiĝas en ĉi tiuj jaroj.

*Lene Niemann*

P.S. Antaŭ nelonge mi interrete serĉis en la datumbanko de la Reĝa Biblioteko, kaj mi estis petata/invitata premi butonon por fari la saman serĉon 'pere de nia nova sistemo por kontroli, ke vi akiras la saman rezulton' ... volonte mi helpas testi la sistemon, – mi premis, kaj kio aperis? paĝaro TUTE EN LA ANGLA!!!!!!! Kompreneble mi tuj skribis, ke kiam ŝtataj kaj 'reĝaj' instancoj antaŭeniras en tiu proceso, mi timas ... kaj same kompreneble mi neniu respondon ricevis.

## Multaj lingvoj – unu familio

La Eŭropa Unio eldonis kajeron kun la ĉi-supra titolo (dane: ‘Mange tungemål – en familie’, De Europæiske Fællesskaber 2004). La kajero temas pri la lingva politiko de la Unio – ĝi rakontas pri la strukturo de la uzataj lingvoj kaj pri la celoj de la enloĝantoj en la diversaj membrulandoj. Estas interesa legaĵo por ni, kiuj ja opinias, ke la esperanta lingvo ofertas rime don, pri kiu – kaj pri kies speco kaj karaktero – EU ŝajne tute ne pensas.

EU agnoskas kaj akcelas la integriĝon inter la landoj, kaj samtempe subtenas la rajton por ĉiu paroli kaj skribi en sia gepatra lingvo.

Por ĉiu membrulando la nacia lingvo (aŭ unu el ili) fariĝas oficiala lingvo de EU, kaj ĉiu povas sin turni al EU en sia propra lingvo – ĉiu politikisto povas paroli en sia propra lingvo. EU estas la internacia instanco kun plej multe da oficialaj lingvoj – en 2004 estis 25 landoj kaj 20 oficialaj lingvoj. Ekzemple en Unuiĝintaj Nacioj estas nur 6 oficialaj lingvoj.

Kompreneble tiu politiko (demokratio, travidebleco) kaŭzas, ke oni en EU bezonas multajn tradukistojn kaj interpretistojn. Ĉiu tria akademiulo dungita estas el unu el tiuj du kategorioj. Tamen la jaraj kostoj estis nur 15 DKK por ĉiu EU-civitano – tio estas antaŭ la pligrandigo de EU en 2004, kaj tiam oni iris de 11 al la nunaj 20 oficialaj lingvoj, Tamen, la kosto ne duobliĝos, ĉar ĝuste pro la multaj lingvoj oni plisimpligis en kelkaj rilatoj la aferon, tiel ke oni ne ĉiam traduku de kaj al ĉiuj naciaj lingvoj.

La kaŭzo, ke EU opinias, ke ne estas problemo kun tiu lingva situacio, estas, ke oni volas, ke homoj lernu plurajn lingvojn. La celo estas, ke ĉiuj scipovu du aliajn EU-lingvojn krom sian propran.

En la kajera teksto oni multe skribas pri la celoj kaj ‘eblecoj por la socio eŭropa kaj por a individuo’ – la individuo povos sin libere moviĝi por loĝi kaj labori, kaj la socio povos tion eluzi.

Eĉ ne per unu frazo oni mencias, ke

- estas grandega tasko ĝisfunde lerni fremdan lingvon
- ne ĉiuj kapablas profunde lerni alian lingvon – kaj tio ne necese diras ion pri la aliaj kvalitoj de tiuj homoj
- kiom ajn bone oni lernas fremdan lingvon, neniam oni parolas same bone kiel indiĝeno, kaj neniam oni povas ‘sur egala lingva fundamento’

diskuti, negoci, interparoli ...

Oni povas diri, ke ‘la eŭropa lingva trajno jam forveturis’ ... la politiko estas ne nur teorio, sed findecidita afero, laŭ kiu oni laboras... sed laŭ mi estas daŭre granda tasko por la esperantistaro klarigi al la instancoj, ke ni disponas rimedon taŭgan por eĉ pli demokratia lingva politiko en La Eŭropa Unio...

*Lene Niemann*

## Gazeteltondaĵoj

Ugebladet Næstved dufoje listigis Esperanto-Unuiĝo de Næstved inter aliaj urbaj unuiĝoj.

Næstved Oplysningsforbund pri Esperanto-kurso.

La gazeto *Arbejderen* pri junulara kongreso en Hanojo, Vjetmanio.

*Information* pri la lingva festivalo en Kopenhago.

Krucvortenigmo en *Samvirke*.

Prelego pri Gronlando fare de Lene kaj Jan Niemann menciita 3-loke en Næstved-aj komunikiloj.

Daŭre sendu ĉion pri Esperanto al:

Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

## Rusa vizito

Neniu el ni dubas, ke venontjare ni celebros okaze de la datrevenoj de KEK kaj DEA. Tamen ĉu vi tute konscias kia mirinda eksalto jam okazos januare?

Nia festa jaro agrable komenciĝos per vizito de la fama verkisto, komponisto kaj kantisto Mikaelo Bronŝtejn de Rusio. La 6-an de januaro ni bonvenigos lin al la centjara datrevena festo de KEK. Tiun tagon li bonkore distros nin per kantado kaj gitara ludado. La sekvan tagon li pluvojaĝos al la kluboj de Ålborg kaj Århus. Revenante al Kopenhago li prelegos en la KEK/DEFA klubo la 14-an de januaro, kaj la temo de tiu prelego estos SEJM, la legenda Sovetia Esperantista Junulara Movado, kiu estis fondita en 1965. Kiel ties iama prezidanto, li estas eminenta informanto pri tiu ĉi temo.



*Mikaelo Bronŝtejn*

Tamen kiu li estas? Mikaelo Bronŝtejn (kromnome Bruna Ŝtono) naskiĝis en Ukrainio en 1949 kaj de 1967 loĝas en Rusio. Lia nuntempa loĝejo estas en Tiĥvin, kiu troviĝas en la SanktPeterburga provinco de Rusio. Mikaelo Bronŝtejn, kiu finstudis ĵurnalismon kaj elektronikon, profesie laboras kiel dungita direktoro en uzino. En 1962 Mikaelo Bronŝtejn esperantistiĝis, kaj li jam dediĉas sian vivon nome de la esperanta afero. Kiel junulo li aktiviĝis en la movado, kaj li eĉ estis prezidanto de SEJM (Soveta Esperantista Junulara Movado). Tamen li estas aparte fama pro sia agado kiel verkisto, poeto, tradukisto, preleganto kaj kantisto. Ĝis nun li jam verkis kelkcentojn da

poemoj kaj kantoj, kaj kelkajn el ili ni sendube povos ĝui la 6-an de januaro. Mikaelo verkis ankaŭ la jenajn romanojn:

Legendoj pri SEJM (1992)

Oni ne pafas en Jamburg (1993)

Mamutido Miĉjo (1995)

Dek tagoj de kapitano Postnikov – historia romano pri eventoj en Rusia Esperantujo antaŭ centoj da jaroj (2004)

Plue li jam tradukis plurajn verkojn de la fratoj Arkadij kaj Boris Strugackij al Esperanto. La plej freŝdata tradukaĵo estas ‘Lundo ekas sabate’ 2005.

Karaj gesamideanoj, elkore mi esperas, ke vi venos bonvenigi Mikaelon en Danion!

Betty Chatterjee

## Kopenhago

### **KEK 1908-2008**

Eĉ se ne plu vivas pioniroj de la Konversacia Esperantista Klubo, restas la entuziasmaj artikoloj en “Dana Esperantisto” (=DE) pri la fondiĝo de nia klubo la 2-an de januaro 1908.

*La juna klubo komencis la novan jaron per rekordo – nome: en sia ĝenerala kunveno (2.jan), nur parolante Esperanton.* (DE januaro-februaro 1908)

*Krom 7 au 8 membroj, kiuj jam lernis Esperanton, supozeble per memstudado, la klubanoj estis lern-*

*antoj de nur trimonataj kursoj, aranĝitaj de ‘Politiken’ en septembro-novembro 1907.* (50-Jara Jubileo de KEK, skribita de Margrethe Noll)

*La diskutado estis tre paca, ... Cetere la vespero estis – kiel kutime – tre serena – precipe por la kasisto, kiu estis preskaŭ mortigata de l’ amaso da klubanoj, kiuj deziris aĉeti biletojn pro la fonda festo.* (DE januaro-februaro 1908)

La verkanto de la artikolo en DE daŭrigis sian artikolon per vigla

priskribo de la fonda festo:

*Tiu fariĝis vera festo! – Neniam antaŭe okazis egale sukcesplena kunveno de danaj esperantistoj! Eĉ la plej sovaĝaj ekspektoj estis superataj – kaj ni efektive timas, ke nia fleksebla lingvo ne posedas sufiĉe da superlativoj pro la preciza priskribo de la sukcesego.*

Proksimume cent novbakitaj esperantistoj partoprenis tiun mirindan feston. La festejo estis bele ornamita per centoj da kandletoj. En la mezo de la ĉambrego staris longa tablo, kovrita per blanka tuko, kun la stampo “KEK” kaj inter malgrandaj kristnaskaj arboj pendis oraj anĝelaj haroj. Unue okazis koncerto kun tri lertaj kantistoj, inkluzive Kaj Bendix (la prezidanto), kiuj kantis danajn kantojn esperantigitajn. Poste oni bone manĝis kaj trinkas la vinon ‘Madero’, kiu babilemigis la gastaron. Pli poste okazis la festprelegoj kaj oni kantis originalan humoran versaĵon laŭ la melodio de la tiam treege populara “Maĉiŝo”, kiu ankaŭ tutmonde populara danco. La festo finiĝis *‘per viva balego’*.

La 2-an de januaro 2008 KEK fariĝos centjara, kaj la 6-an de

januaro ni festenos tiun centjaran datrevenon en nia nuntempa klubejo en Dortheavej 61.

Kia estos la festo?

Tiam kelkaj reprezentantoj de Politiken partoprenis la feston. La nuntempaj reprezentantoj de Politiken bedaŭras pro la fakto, ke ili ‘havos aliajn aranĝojn’. Ne gravas! Ole Stig Anderson, kiu verkis tre pozitivan artikolon pri lingvaj festivaloj kaj Esperanto por la gazeto ‘Information’ la 14-an de septembro, jam akceptis nian inviton partopreni la feston.

Tiam la klubanoj ĝuis koncerton. Ankaŭ ni ĝuos koncerton, ĉar ni bonŝance bonvenigos la faman kantiston Mikaelo Bronŝtejn de Rusio kaj la danan koruson ‘Tapkoret’, kiuj tiel imponiĝis aŭdi pri la esperantigitaj danaj kantoj, ke ili volus kanti kelkajn el ili.

Tiam oni manĝis festmanĝaĵon kaj mielajn kukojn. La festmanĝon de la sesa de januaro kuiras la kuiristoj en la kulturdomo, tial ĝi certe estos manĝinda.

Tiam la plej granda parto el la membraro estis juna, kaj ili dancis la tutan nokton. Nuntempe? Ni? ‘viva balego’ ... ĉu?

*Betty Chatterjee*

## ***Invito al jubilea festo***

Karaj membroj kaj amikoj en Esperantujo!

La 2-an de januaro 1908 fondiĝis la Konversacia Esperantista Klubo en Kopenhago. Tiam la kluba kunveno troviĝis Kongens Nytorv 8. La urbo intertempe kreskegis, kaj nuntempe nia kunveno troviĝas en loko kie siatempe estis nur kampoj: Dortheasvej 61, en la Kulturdomo *Nordvest*, kiu estas parto de la kultura levo aktuale okazanta en tiu parto de nia urbo.

Tie ni festos la unuajn cent jarojn!

Dimanĉon la 6-an de januaro ni renkontiĝos je la 13-a por manĝi festenan lunĉon. Post la manĝo nia honora gasto Mikaelo Bronŝtejn el Rusio distros nin per kantado kaj gitara ludado. Venos ankaŭ la koruso Tap-kor, kiu distros nin per kantado de danaj kantoj esperantigitaj.

Prezo por la lunĉo (ne inkluzive trinkaĵojn), kafo/teo kaj festena kuko: 220 kronoj.

Bonvolu informi nin, se vi deziras vegetaran manĝaĵon.

### **Aliĝo kaj pago plej malfrue la 15-an de decembro**

(Laŭeble pagu al ĝirokonto 1551-2025558, indikante “Festeno” kaj vian nomon).

*Elkore salutas*

*La estraro de KEK.*

*Anonco*

Pri tute persona iniciato – legemulo serĉas legemulojn.

Mi serĉas esperantistajn gelegemulojn, kiuj eble 3-4 fojojn dum la venonta jaro pretos renkontiĝi kun mi en iu kafejo por Esperante diskuti pri antaŭe (grupe) elektita romano aŭ novelaro.

Amike

Betty Chatterjee (chatterjeebetty@hotmail.com)



## ***Kopenhaga kalendaro***

La du kluboj KEK kaj DEFA-Kopenhago kunvenas ĉiulunde en *Bispebjerg Nordvest Kulturhuset, Dortheavej 61, 2400 København NV*. En la kafejo oni povas aĉeti trinkaĵojn kaj manĝaĵojn, en la kunvenejo aĉeteblas kafo/teo. La kafejo situas en la teretaĝo, la kunvenejo en la dua etaĝo. Kunvenoj okazas ĉiulunde 19.00 – 21.00.

La Esperanto-Kulturgrupo (EKG) kunvenas monate en *la Civitana Domo de Frederiksberg, Danasvej 30B, 2000 Frederiksberg*. Kostas 10 kronojn por kafo/teo/kuko kaj 10 kronojn por la prelego. La kunvenejo troviĝas en la dua etaĝo, en la tera kaj unua etaĝoj troviĝas publika biblioteko. Prelegoj komenciĝas je la 19.30.

### **Okazos en 2007**

*Ma 13/11* **EKG** ”Denove mi renkontiĝis kun espero...”. Alexander Kogan prelegas pri la rusa poeto, komponisto kaj verkisto Bulat Okuĝava (1924-1997), kunkreinto de la ”amatora kanto” en Rusio.

*Lu 3/12* Jubileo kaj historio 4. Ileana Schrøder kaj Betty Chatterjee rakontos pri la ”patro kaj patrino de la dana Esperanto-movado” Margrethe Noll kaj Frederik Skeel-Giörling.

*Ve 7/12* **EKG** ”Elementoj de la vivo kaj verkaro de Raymond Schwartz”. Prelego pri la fama Esperanto-aŭtoro de Sten Svenonius, Malmö.

*Lu 10/12* Lasta ĉi-jara kunveno de la kursoj kaj studgrupoj. Baldaŭ estos kristnasko, Zamenhofa festo, centjara jubileo – la festokaŭzoj amasiĝas. Venu por kunprepari la jubilean etoson kaj bonvenigi la kursanojn en la Movadon.

*Sabate 15/12 19.00-22.30* **Zamenhofa festo** en Danasvej 30B.

KEK kaj EKG ĉi-jare kune okazigas la feston. Ĝi inkluzivos: spektadon de dvd-filmo pri danlingvaj informaj aktivecoj pri Esperanto; deklamadon de tri poemoj; kristnaskajn kantojn kaj vivantan muzikon; libroservon; rakonton el kontakto kun Pasporta Servo. Manĝo kaj trinkaĵo (sandviĉoj kaj salato, kukoj, klementinoj kaj ĉokolado) kostas po 60 kronojn je persono. Aldonaj trinkaĵoj estas aĉeteblaj.

Bonvolu aliĝi kiel eble plej baldaŭ (NB – limigitaj sidlokoj) kaj

**plej malfrue vendredon la 7-an de decembro 2007**

al: Torben Svendsen (3874 9764, [kulturgrupo@webspeed.dk](mailto:kulturgrupo@webspeed.dk)).

## **Okazos en 2008**

*Di 6/1* 100-jara datrevena festeno – vidu la apartan inviton. Bv. pagi plej malfrue 15.12.2007!

*Lu 7/1* La klubo estas fermita!

*Lu 14/1* Prelego pri SEJM de Mikaelo Bronŝtejn. Vidu la apartan artikolon!

*Lu 11/2* Jarkunveno de KEK. La tagordo estos ĝustatempe dissendita rete kaj letere.

*Lu 18/2* Nina Tofte Hansen, studentino ĉe la agrikultura altlernejo en Kopenhago, rakontos pri sia studo.

## **Okazis**

Kia aktivega aŭtuno! En Kopenhago DEA ĉeestis la Danan Socian Forumon la 28-30 de septembro kaj la kulturalan nokton la 12-an de oktobro; KEK partoprenis la Internacian Tagon la 9-an de septembro, kaj la tagon antaŭe EKG reprezentigis en la "Tago de la Asocioj" de Frederiksberg. Sed precipe raportindas pri...

## La dua Kopenhaga Lingvofestivalo

La 15-an de septembro okazis la granda ĉi-jara investo de KEK, nome la Lingvofestivalo kunlabore kun la Gronlanda Domo. En ties ĉambrego kiu normale funkcias kiel manĝejo, estis foiro: standoj kun libroj, periodaĵoj, sonbendoj kaj simile, kuiraj specialaĵoj el la diversaj landoj, kaj scenejo kie oni diverslingve muzikis kaj kantis.

Ĉe unu stando oni vendis lingvan kvizon, kiu funkciis kiel lotumado: Se oni povis elekti la ĝustajn respondojn de 12 demandoj, oni ricevis premion. Eble la demandoj tamen estis iom tro malfacilaj, ĉar ni devis malaltigi la postulon al 11 ĝustaj respondoj por sukcesi seniĝi pri la premioj...

En ĉi tiu festivalo oni povis laŭ

tiu aŭ alia maniero – prelego, fulmkurso, literaturo, muziko, manĝaĵo – konatiĝi kun preskaŭ dudeko da lingvoj/kulturoj: gronlanda, nederlanda, angla, franca, hispana, itala, romanĉa (en Svislando), latina, serbokroata, pola, latva, jida, Esperanta, somalia, karibia kreolfranca – kaj pli. La inaŭguran paroladon faris la rumana ambasadoro, pri sia gepatra lingvo. Estis ankaŭ pli ĝeneralaj prelegoj pri lingva politiko, lingvoinstruado k.s.

La festivalon dokumentis krom granda, sobra kaj fervora artikolo en Information ankaŭ artikolo en "Arbejderen" kaj filmis loka televido, kiu rezidas en la kulturdomo *Nordvest*.

Lunde la 3-an de septembro Mogens Rude Andersen prezentis bonegan prelegon pri la historio de la esperanta movado. Ĝi estis la unua el serio de historiaj prelegoj okaze de la baldaŭa 100-jara jubileo de Dana Esperanto-Asocio. Mogens bonhumore kaj bonretorike kondukis nin tra historia vojaĝo; de la unuaj ideoj pri monda lingvo ĝis la establo de la unuaj esperantistaj kluboj en Danio. Estis kvazaŭ detektiva esplorado kiam ni sekvis la spurojn de la pioniraj esperantistoj en Danio. La detektiva vojaĝo gvidis nin de suda Jutlando al meza Selando, al Germanio kaj eĉ trans Atlantikon al Usono. Kaj ĉiuj aŭskultantoj sekvis Mogens preskaŭ senspire de komenco ĝis fino.

*Nina Tofte Hansen*

La 8-an de oktobro Jytte Sunekær faris la duan prelegon en la historia serio, rakontante pri Dana Laborista Esperanto-Asocio. En 1932 ekestis en Kopenhago la klubo "Antaŭen". En 1935 ĝi renomis sin "Laborista Esperanto-Klubo" kaj asociiĝis kun kluboj en Århus, Viby, Hinnerup kaj Odense en DLEA, kiu samjare aliĝis al SAT. DLEA vivis ĝis 1992, kun strukturo tute paralela al tiu de DEA. La plej longedaŭraj prezidantoj estis Holger Hansen (1939-1964) kaj Åge Bense (1964-1992), sed la internacie plej konataj membroj estis Paul Neergaard kaj Poul Thorsen. Mirindan aktivecon DLEA montris dum la 2-a Mondmilito; en 1942 aperis la valora eseero "Tra densa mallumo" kaj en 1943 aliĝis grupoj en Hillerød, Ålborg kaj Randers. Tiom pli mirinde, ĉar pluraj membroj estis aktivaj rezistantoj.

Neniam estis gravaj personaj malkonkordoj inter DLEA kaj la aliaj danaj Esperantoorganizoj, kvankam ene de la neŭtralaj tio ĉiam estis granda problemo. La ĝenerala malinteresiĝo pri Esperanto nialande post ĉ. 1960 tamen pli forte trafis DLEA; en 1988 la ĵurnalisto Poul Martinsen kreis por DR televidaĵon pri LEK, kiu sukcesis senmoke elmontri la naivecon kaj persistemon de tute speciala grupo da idealistoj. – La tria epizodo de la historia prelegserio okazis la 5-an de novembro, kiam Jan Niemann montris lumbildojn postlasitajn de Poul Thorsen.

## Ålborg

9-a de januaro je 19.30 : Aleksandr Puŝkin - vivo kaj kreado.

Prelego de Mikaelo Bronŝtejn.

"Sunio de la rusa poezio" - tiun titolon oni jam dum ducent jaroj atribuas al Aleksandr Sergejeviĉ Puŝkin. Pri la neordinara biografio, kaj la geniaj kreitaĵoj de tiu Homo temas la prelego, ilustrata per multaj poeziaj tradukoj.

## Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tlf 5572 1240, rete atingebla pere de: [eho-esperanto@stofanet.dk](mailto:eho-esperanto@stofanet.dk).

Ve 16.11. je h **14.00**: Kunveno kun trakto de ĉapitro 21 de *F+F*.

Ve 30.11. je h **14.00**: Kunveno kun trakto de ĉapitro 22 de *F+F*.

Ve 14.12. je h **13.00**: Jul-aranĝo kun abunda manĝado je kosto de po 50 kr + livero de donaceto, kiun ni lotumos inter la ĉeestantoj. Aliĝo necesa plej malfrue la 11an de decembro al Grete (5572 1240). – Post tio julferio ĝis 11.01. Bonajn festotagojn!

Ve 11.01. je h 19.30: Danlingva prelego fare de Sisse Gry Olsen: *Bildoj de Sirio*. Pri studvojaĝo sub aŭspicio de Mellempopkela Samvirk.

Ve 15.01. je h **14.00**: Kunveno kun trakto de ĉapitro 23 de *F+F*.

Ve 08.02. je h 19.30: Danlingva prelego pri la *Cree-indianoj* en Kanado. Prezento Ole Ingstrup.

Ve 22.02. je h 20.00: Ĝenerala kunveno de EUN kun laŭstatuta tagordo. Kaf/tetrinkado je kosto de la unuigo je h 19.30.

Ve 29.02. je h **14.00**: Kunveno kun trakto de ĉapitro 24 de *F+F*.

Ve 07.03. je h 19.30: Danlingva prelego fare de Birthe Trærup pri la komponisto Bedřich Smetana.

Ve 28.03. je h 19.30: Sezonia aranĝo.

**Okazis:** kelkaj kunvenoj kun trakto de ĉapitroj el Faktoj kaj Fantazioj. Kvankam ni plurfoje uzis la libron dum la kunvenoj, ni ĉiam povas ĉerpi novajn trajtojn el la interesaj tekstoj.

12.10. vizitis nin Lene kaj Jan U. Niemann. Per trafaj fotoj de tri gronlandaj urboj kaj rakonto pri iliaj karakterizaĵoj ni ekhavis bonan impreson pri la diverseco de la evoluo en la lando.

02.11. Jørn Dysted rakontis pri impresoj en la antaŭaj danaj insuloj en la Malgrandaj Antiloj, precipe de St.Croix. Interesa kaj verve rakontado.

# Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, Søndervangen 10, 1.th., 8260 Viby J.

Tel.: 86 29 23 06, retpoŝto: stanislaw@forum.dk.

Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.

Kunvenoj: lasta (kun esceptoj) ĵaŭdo de ĉiu monato je la 19:30 h.

## **Okazos**

29.11: Hungario – Stanisław Mielczarek rakontas pri sia vojaĝo al tiu interesa lando.

13.12: Zamenhof- kaj Kristnaskofesto. Rimarku: komenco je la 19:00 horo!

### **Atentu: la 10.01.2008 estos eksterordinara kunveno.**

Nian klubon vizitos lerta rusa esperantisto, nome Mikaelo Bronŝtejn kiu prelegos pri “Retrospektivo de rusaj festoj”. - Kredeble nur la rusoj posedas tian ravan tohuvabohuan festaron, en kiu kirle miksiĝas la festoj paganaj kaj kristanaj, internaciaj kaj komunistaj, ligitaj al historiaj eventoj kaj truditaj de la ŝtata gvidantaro. Per vodko, gitaro kaj video, Mikaelo provos iel-tiel sistemigi la festaron, estimatan en Rusio ĝis la nuna tempo.

## **Okazis**

27.09: Niaj someraj travivaĵoj. Dum la somero 2007 niaj klubanoj estis en diversaj landoj: Luja Miletić rakontis pri sia ekspatrujo – Kroatio, kiun ŝi regule vizitas kune kun sia edzo. Henry Simonsen rakontis pri ferio en la somera dometo en Svedujo. Stanisław Mielczarek rakontis pri sia kuracado en pola sanatorio en la ĉarma urbo Ciechocinek.

25.10: Bedaŭrinde venis neniun partoprenanto! Ĉu vi forgesis?

Gajan Kristnaskon kaj feliĉan Novjaron 2008 deziras la estraro de la Esperanto-klubo de Århus.

### Selten en "pola Davos"

*Kun financa subteno de Esperantic Studies Foundation, la japana mecenato Etsuo Miyoshi, kaj UEA, ĉi-jare Eŭropa Esperanto-Unio forte reprezentigis ĉe la prestiĝa ekonomia forumo en la pola urbo Krynica. La budo de EEU staris tuj kontraŭ la enirejo de la ĉefa konstruaĵo, kaj ricevis grandan atenton. La temo de la ĉi-jara forumo estis "Eŭropo – krizoj, ŝanĝoj aŭ ŝanco?", kaj EEU povis kontribui al ĝi kun propra seminario pri la lingva komunikado en Eŭropo. La seminarion partoprenis interalie la ekonomipremiito Reinhard Selten, kiu aldone havis plurajn alian programerojn, kaj plurfoje publike pledis por Esperanto.*



De la 5-a ĝis la 8-a de septembro 2007 okazis en pola kuracurbo Krynica la 17-a Ekonomia Forumo – en polaj amaskomunikiloj nomata "pola Davos". La aranĝon ĉeestis ankaŭ Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), kiu plurflanke

kontribuis al la ĉi-jara programo de la Forumo kun la ĉeftemo "Eŭropo – krizoj, ŝanĝoj aŭ ŝanco?".

EEU jam pasintjare unuan fojon ĉeestis la aranĝon, ĉi-jare do venis duan fojon, pli bone preparita, kun multaj informiloj kaj kun pluraj elstaraj gastoj.

**Grave al la tuta prezento de Esperanto en la forumo** kontribuis s-ro profesoro Reinhard Selten, kiu estis por la Forumo certe alloga partoprenanto, des pli, ke estis unuafoje, ke la Nobel-premiito por ekonomiko ĉeestis la

Ekonomian Forumon en Krynica.

Reinhard Selten, kiu ricevis la premion honore al Alfred Nobel pri ekonomiko en 1994, havis eĉ 4 apartajn programerojn: li prelegis por ”junaj gvidantoj” (dum aparta aranĝo akompana al la Forumo, Ekonomia Forumo de Junaj Gvidantoj), li ĉeestis dum la ĉefa foruma diskuto ”Konkurenckapablo de Eŭropo en la tutmond-iĝanta mondo” kaj dum la podia diskuto de EEU pri la temo ”Eŭropa Unio – lingva komunikado. Krizoj aŭ ebleco?”, kaj krome li havis aŭtoran vesperon, dum kiu li prezentis sian premiitan ludoteorion al la interesita publiko. Plurfoje li pledis por Esperanto, kiel por unua instruata fremda lingvo en lernejoj, kaj liajn vortojn atenteme aŭskultadis la ĉeestantoj.

**Dum la propra** programero de EEU kontribuis al la diskuto jenaj podianoj: Reinhard Selten – Nobel-premiito pri ekonomiko; Seán Ó Riain – karia diplomato, prezidanto de EEU; Etsuo Miyoshi – entreprenisto, mecenato de Esperanto; Barbara Despiney-Zochowska – ekonomia esploristo de Pariza scienca instituto; Witold

Stepniewski – prorektor de la teknika universitato en Lublin; Aida Čižikaitė – juristino kaj lingvistino, de Universitato de Vilnius. Post unuopaj prezentoj de la lingvaj temo kaj problemoj – kaj eventuala solvo de ĝi - okazis interesa diskuto, dum kiu elpaŝis ekzemple juna pola lingvistino de Universitato de Adam Mickiewicz en Poznań, diplomato de Latvio aŭ membro de Eŭropa Komisiono.

La aranĝon ĉeestas kutime multaj gravuloj – politikistoj, diplomatoj, ekonomiistoj, manaĝeroj, entreprenistoj – plej ofte el meza kaj orienta Eŭropo. Ĉi-jare eblis vidi inter la gastoj de la Forumo famajn personojn, ekzemple la eksprezidentojn polan respektive ĉeĥan, Aleksander Kwaśniewski kaj Václav Havel... Ne mankis ambasadoroj, EU-komisionanoj, manaĝeroj de grandaj naftaj aŭ komputilaj firmaoj.

**Dum la tuta aranĝo funkciis** stando de EEU – en kiu oni kaj prezentis Esperanton (pere de projekciado, libroj, diskoj, DVD-oj) kaj disdonis informilojn pri la lingvo. Estis preparitaj pluraj informiloj en ĉiuj 3 oficialaj lingvoj de la Forumo (pola, angla,



rusa) – kiujn oni disdonis kaj ĉe la stando kaj surstrate. Dum deĵorado reprezentantoj de EEU sukcesis alparoli plurajn gravajn politikistojn kaj doni al ili Esperanto-pakaĵojn. Pri la EEU-budo estis ĉi-jare eksterordinara intereso de la publiko, parte ankaŭ pro la bona loko de la budo – ĝi situis tuj kontraŭ eniro al la ĉefa konstruaĵo de la Forumo. Pluraj homoj eĉ aĉetis lernolibrojn kaj DVD-ojn pri Esperanto. Ĉe la stando deĵoris krom Peter Baláž, estrarano de EEU, ankaŭ 3 membroj de Pola Esperanto-Junularo.

Prezento de Esperanto-temo en tiu ĉi aranĝo estis certe unu el ĝiaj plej prestiĝaj ĉi-jaraj prezentoj. Oni ekzemple konsciu, ke krom EEU estis en la forumo neniam standoj de neregistaraj organizoj, entute en la forumo staris nur ĉ. 20 standoj, el kiuj ceteraj estis aŭ prezent-standoj de grandaj

elektro- kaj nafto-firmaoj, aŭ standoj de regionoj kaj/aŭ urboj de Pollando.

**La ĉeeston de esperantistaro** dum la Forumo, samkiel preparon de informiloj, ebligis financa helpo de ESF (Esperantic Studies Foundation), Etsuo Miyoshi kaj UEA (Universala Esperanto-Asocio) – al kiuj la tuta EEU-estraro elkore dankas por la ebligo de tiu ĉi prezento de Esperanto en tia aranĝo.

Plej meritita danko por la aranĝado de la tuta (kaj entuta) ĉeesto de Esperanto en la Forumo apartenas al s-ino Halina Komar, kiu – aganta je loka nivelo en proksima urbo Nowy Sącz – danke al tiu agado ebligis alt-nivelan kaj prestiĝan prezenton de Esperanto kaj de lingvo-politiko en la Ekonomia Forumo. Jam nun estas preparata ĉeesto dum la venonta, 18-a Forumo – espereble ĝi estos samsukcesa kiel la ĉi-jara.

*Peter Baláž [Libera Folio]*

## Ne plu loko

En aŭgusto la artista duo "La Loko" anoncis sian dissolviĝon. Ili tamen plu artistas individue pri Esperanto; ekzemple Daniel Salomon prelegis pri la seksa vivo de la heliko en Stuttgart kaj pri ostroj en Novjorko.

## Ĉîĉeronado en Strasburgo

500 000 vojaĝantoj eniras la boatojn de la Strasburga Sen-dependa Haveno ĉiujare. Pro tio, kaj celante utiligi Esperanton, ni proponis al la Haveno traduki la promenadon tra la urbocentro kaj la eŭropa kvartalo al Esperanto.

La estro de la haveno akceptis la proponon, kaj transdonis la francan tekston al ni. Post adaptiĝo al la internacia publiko kaj traduko, helpitaj de Catherine Roux kaj Ginette Martin, la strasburgaj klubanoj surbendigis ĝin. Ni fine kontrolis longecon de ĉiu sekvenco, kaj dank' al la ĉina versio kiu estas ofte longa, ni havis

sufiĉe da tempo por paroli klare.

Esperanto nun fariĝas la deka lingvo aŭskultebla dum la vizito. Antaŭ ĉiu ekiro, la ŝipestro anoncas ĉiujn dek lingvojn per laŭt-parolilo. Ĉiuj ĉeestantoj aŭdos la frazon "Por aŭskulti la ĉîĉeronadon per la internacia lingvo Esperanto, elektu numeron 10".

Ĉar eble vi ne havos tempon enŝipiĝi, aŭ vi ne ŝatas tiun rimedon por malkovri la urbon, vi povas elŝuti la sondosierojn kaj aŭskulti ilin per via mp3-ilo.

Vizitu <http://www.esperanto-strasbourg.net> aŭ <http://benecyril.free.fr>.

*Cyrille Hurstel [ret-info]*

## Honorigo

Dum la UK en Jokohamo la Komitato starigis novan formon de honorigo: "Diplomo pri Elstara Agado", pri kies aljuĝo decidis la Estraro. Ĝiaj unuaj ricevantoj estas la germana Interkultura Centro Herzberg kaj s-ro Donald J. Harlow el Usono.

La Centro en Herzberg famiĝis en la Esperanto-movado pro sia aktiva kaj altkvalita agado, kies elstara frukto estis la decido de la urbo Herzberg oficiale deklari sin Esperanto-urbo. S-ro Don Harlow estis diplomita pro pionira Esperanta aktivado en interreto.

*[ret-info]*

# Anonco

## RevuServo de DEA

Denove alproksimiĝas nova jaro, kaj nun estas tempo mendi revuojn.

Se vi deziras aboni, skribu aŭ telefonu por ĝirilo – sed bonvolu memori, ke la limdato por pago estas

**la 10-a de decembro 2007.**

Kontaktu min telefone 3920 6348 aŭ 2140 8487.

Rete: [arnecasper@dbmail.dk](mailto:arnecasper@dbmail.dk)

Pagonte, bonvolu uzi la kodo(j)n:

<i>Kodo</i>	<i>Nomo</i>	<i>Abonprezo</i>
OdE	Ondo de Esperanto	245.- kr.
LE	La Espero	170.- kr.
RE	Revuo Esperanto	275.- kr.
NV	Naturista Vivo	120.- kr.
LJ	La Jaro	40.- kr.
JA	Juna Amiko	110.- kr.
Mon	Monato	365.- kr.
FE	Femina	165.- kr.
LF	Literatura Foiro	260.- kr.
BA	Beletra Almanako	250.- kr.

(*Beletra Almanako* estas nova beletra revuo, kiu en 2008 aperos en marto kaj septembro, ĉiufoje kun ĉirkaŭ 175 paĝoj)

---

## Ago-aŭtuno de DEA

---



← 5.-7. de oktobro okazis en Marienlyst Centeret la foiro "Krop-Sind-Ånd", kie DEA havis standon. Jen deĵoras Lis-Lotte Talbro el Odense. Interesitoj aliĝis al kurso kiu komenciĝos en januaro.



La salono ↑ kaj nia budo ↗ dum la lingvofestivalo en la Gronlanda Domo

Esperantistoj kaj interesitoj ĉe nia ekspozicio en "Huset" dum la Kultura Nokto en Kopenhago →

